THE BRITISH ESPERANTIST

with which is incorporated

INTERNATIONAL LANGUAGE

Vol. XXXII, No. 420/421 APRIL/MAY, 1940

Annual General Meeting of B.E.A. and Conference

Imperial Hotel, Temple Street, Birmingham, 11th and 12th May, 1940

All Esperantists will agree that in the conditions of the present time special thought and deliberation need to be given to the ways and means of effectively furthering the claims of the language. It is therefore hoped that as many B.E.A. members as possible will attend this Conference. Besides the very important Annual General Meeting of the B.E.A., other meetings will provide opportunities for the consideration of propaganda and other matters. On the social side, our Birmingham friends are ensuring an enjoyable evening on the Saturday.

In these difficult days it is more than ever necessary to show the public that Esperanto is a living force, and a well-attended Conference of its adherents can do much in this direction.

Congress tickets, 2/-, can be obtained from the Secretary beforehand, or on arrival, but please send for your lunch ticket from the Secretary of the B.E.A. by May 5th if you desire to have the lunch on Sunday.

COME TO BIRMINGHAM ! JOIN EARLY !

PROGRAMME

Saturday—
5.30 p.m. I.E.L. Meeting.
7.30 p.m. Dance.

Sunday—
9.00 a.m. Divine Service in The Priory Rooms, Friends' Meeting House, Bull Street (near the Imperial Hotel), led by Frank Goodliffe.
10.00 a.m. Annual General Meeting of B.E.A.
1.00 p.m. Communal Lunch.
3.00 p.m. Meeting arranged by the B.E.A. Propaganda Committee.

Monday—The Conference will finish on Sunday evening, but excursions will be arranged if desired by those remaining, and according to local circumstances.

R. B. W.

The Zamenhof Family

With reference to the appeal in the February *British Esperantist,* we are pleased to be able to inform readers that we have at last succeeded in obtaining some definite and apparently reliable information. Dr. Adam Zamenhof is in prison in Warsaw; his wife, together with his sisters Lydia and Sofia are in another prison; his son, Ludovic, is at liberty and staying with friends in Warsaw.

We are continuing our efforts to get the family out of the country, and if they are successful a fairly large sum will be required to cover their expenses. So far just over £40 has been received (a list of the donors will appear in *Heroldo de Esperanto* and *Esperanto Internacia*), and further contributions will be very welcome. If, finally, the money should not be required, it will be refunded; but if, in that case, you would like it to be used for any other purpose, please state this when sending remittance.

CECIL C. GOLDSMITH,
Secretary.

International Esperanto League,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.

Miaj Francaj amikoj petas nomojn de Anglaj soldatoj kaj aliaj, pretaj korespondi (en Esperanto, kompreneble !) kun Esperantistaj soldatoj Francaj. Se vi volas entrepreni ĉi tiun interrilaton korespondan, skribu al mi detalojn (nomo, adreso, specialaj interesoj, aĝo — almenaŭ proksimuma !). Skribu la informon sur aparta papero. Ronald B. Wilkinson, Sek., B.E.A.

NOTES ON ESPERANTO PRONUNCIATION*

We are so often asked for a clear and simple statement on Esperanto phonetics, with special reference to the I.P.A. script, that the following extracts from an unpublished collection of notes for the advanced student should meet a widespread demand.

We find minute variations of speech, even in good speakers of normal English. No two persons have precisely the same speech, and each man varies his own speech in varied circumstances. Obviously, similar small variations—oscillations to either side of the normal—are inevitable in Esperanto also: a spice of variety or individuality may even give pleasure to the hearer. It would be absurd to insist on an unattainable absolute uniformity. But we should aim at a close approximation to uniformity, and never exceed the limit beyond which variation might lead to loss of intelligibility. E.g., it is less important to insist on some particular method of pronouncing **r** or **l** or **t**, than to keep the difference clear between **aĝo**, **aĵo**; **roso**, **rozo**; **brava**, **prava**; **homaro**, **omaro**; **veno**, **vejno**; **mi amas la viron** (**veron**).

Speech may have various qualities. It may be (a) *beautiful* (**bela**), (b) *clear* (**klara**), (c) *loud* (**laŭta**), and (d) *quick* (**rapida**), or the opposites, in varying degree. These are matters for the elocutionist, and lie outside the scope of this article. Let us merely note that (a) Even Esperanto, one of the most beautiful of languages, may be made to sound repulsive if murdered. (b) Speech that is not audible and intelligible is to that degree useless. The vowels in particular should be clearly pronounced. (c) It is a mistake to teach that (presumably in order to attract the interest of the outsider) Esperanto should always be spoken twice as loudly as any other language. Shouting does not necessarily mean clearer articulation. And from the propaganda point of view, it is better to let the outsider be attracted by the beauty of the language, and, when he is obviously listening, and wondering whether it is Italian, to introduce the word *Esperanto* into the conversation! (*d*) It is a mistake to imagine that Esperanto must always be spoken three times as slowly as any other language, with a pause between each word. Such laboured utterance is unnatural, painful to hear, and (even for the *ĉiama komencanto*, who in any case is not under discussion) less intelligible—for the music of the sentence is thus lost. Many Esperanto talks on the Radio suffer in this way. Esperanto speech should conform to the norms of natural speech. We speak (and hear) phrases, rather than isolated words. To the complaint *Vi parolas tro rapide* Cseh replied *Vi aŭdas tro malrapide*: there is much wisdom in this reply.

A sound may have *pitch* (**alto**), *intensity* (**laŭto**), *duration* (**daŭro**), and *quality* (**koloro, tembro**). A sound or element of speech may be a *vowel* (**vokalo**) or a *consonant* (**konsonanto**).

VOWELS

CLASSIFICATION—

A vowel may be described—

(1) By the part of the tongue used.
Front (**antaŭa**): **I, E.**
Back (**posta**): **A, O, U.**

(2) By the approach of the tongue to the palate.
High (**alta**): **I**, **U**.
Middle (**mezalta**): **E**, **O**.
Low (**malalta**): **A**.

(3) By the relative amount of mouth-opening, and tension or relaxation of the tongue-muscles (there are two varieties of most vowels: one, open and lax; the other, close and tense).
Open (**vasta**): e.g., *i* in *it*.
Close (**malvasta**): e.g., *i* in *machine*.

(4) By length (**daŭro**).
Long (**longa**). *Short* (**mallonga**).

The same vowel-sound may be of long or short *duration*. Thus, in the English word *bat* the *a* is short, but in *mad* (emphatic) the same vowel may be long. Length depends largely on accent (**akcento**) (=stronger, louder pronunciation), an accented vowel being often longer; while vowels that are unaccented, or occur in unimportant words, are often short (N.B.—**Akcento** is usually used for stress of syllables: **emfazo** for stress of words).

(5) By the rounding of the lips (**liprondigo**).
Rounded (**ronda, rondlipa**): **U**, **O**.

(6) By the part played by the nose, through which the breath passes when the soft palate is lowered (**nazeco**).
Nasal (**naza**).

* Distinguish **prononco** (*pronunciation*) from **elparolo** (*enunciation*).

ESPERANTO AND ENGLISH VOWELS COMPARED

The phonetic script (given in square brackets) is that of the International Phonetic Association ("Broad" transcription), as given in *The Pronunciation of English* (Daniel Jones), 1919.

FRONT VOWELS (Hard Palate)

Esperanto Vowel	Phonetic Script	Heard in English
I	[i :]	*we, green, leap.*
	[i]	*is, give, bit.*
E	[e]	*men, red.*
	[ϵ]	(first vowel in) *there, their.*
—	[æ]	*man, cab* (not in Esperanto).

BACK VOWELS (Soft Palate)

Esperanto Vowel	Phonetic Script	Heard in English
A	[ɑ :]	*Pa, father, calm.*
—	[ɔ]	*hot* (not in Esperanto).
O	[ɔ :]	*all, saw.*
	[o]	*November, vocation* (first vowel in *go*).
U	[u]	*good, foot.*
	[u :]	*too, food.*

CENTRAL VOWELS (not occuring in Esperanto)

Esperanto Vowel	Phonetic Script	Heard in English
—	[ʌ]	*but, much.*
—	[ə]	(short *er* in) *china, above, a. the* (unemphasized).
—	[ə :]	(long *er* in) *her, fir, work, fur, bird.*



The five Esperanto vowels **I E A O U** may be arranged in a circle (as here shown, with no attempt at scientific accuracy). The series may be heard very roughly in the words **miaŭ** and (in reversed order) *why*, much drawled. Between each of these five sounds and the adjacent ones numerous intermediate shades of vowel-sound are possible, many of which are found in various national languages. The important thing in Esperanto is to keep each of the five vowels distinct from its neighbours: a middle sound, not too much to the right nor to the left. Probably this is what Zamenhof meant when he advised that the vowels should be pronounced *nek tro fermite, nek tro malfermite, ĉiam meze.* (See *Step by Step*, pp. 11–12).

NOTES ON INDIVIDUAL VOWELS

A.—Do not sound this as [æ] in *hat.* Do not sound it as [ə], e.g., do not pronounce **suna, obea,** like *sooner, obeyer*). Do not add an "r" before a vowel (e.g., do not say **lar aliar ombrelo**). Do not swallow the "a" in the endings **-as, -an**.

E.—Ranges between [ϵ] (=the first vowel-sound in *there* without the subsequent [ə] -glide) and the short [e] in *then.*

I.—Ranges between [i :] in *he* and [i] in *it* : the first is usually better. N.B. : **birdo** should be pronounced *beer-do* not *ber-do* [bi : rdo, not bərdo].

O.—Ranges between [o] in *November* (=the first vowel-sound in *go*, without the following *u*-glide) and [ɔ :] in *law.* It is said that in southern English there is no pure "o"; nevertheless the first vowel in *donation, vocation, domain, November,* is usually a fair approximation. Do not sound the Esperanto **o** as [ɔ] in *got* : e.g., **-os** in **-estos** does not rhyme with the English word *toss.**

U.—Ranges between [u :] in *too* and [u] in *good* : the first is usually better. Do not sound it as [ʌ] in *but.* Do not add a "j" as in the English *you* (Esp **ju**) : i.e., pronounce **tubo** too-bo [tu : bo], not tyoo-bo [tju : bo].

VOWELS IN COMBINATION

Any vowel may follow any other. The 25 possible combinations are heard in the words **maato, aero, naiva, faraono, balau, reala, ree, feino, eono, linoleumo, tiaro, mielo, kanariino, miopa, radiumo, boato, poemo, foino, koopero, trouzi, vualo, mueli, ruino, ĝuos, influu.** On the representation of these combinations in Pitman's shorthand, see *Raporta Stenografio*, par. 4.

There is a natural tendency in pronunciation to introduce a superfluous **j** or **ŭ** between two vowels : **mija, kijel, tijo, ĉiju, kreji, ĉejesti, unuŭa.** This is not dangerous, but is better resisted (L.R. 14).

DIPHTHONGS

When two vowels are glided together into one syllable, giving the impression of a single sound, this sound is called a *diphthong* (**diftongo**). Here are Esperanto and English diphthongs compared, with their symbols in phonetic script.

* There is a tendency, however, so to pronounce the word **ok**, especially in **okdek** (i.e., making it rhyme with *lock*) : there is no great danger in this

Esperanto Diphthong	Phonetic Script	In Esperanto	In English
AJ	[ai]	**kaj**	*sky, fly, I.*
EJ	[ei]	**plej**	*play, may.*
OJ	[ɔi]	**sojlo**	*soil, boy.*
UJ	[ui]	**prujno**	——
AŬ	[au]	**laŭ**	*allow, cow* (app.)
EŬ	[eu]	**pleŭro**	——
OŬ	[ou]	**poŭpo**	*pope, cold, boat.*
—	[ɛə]	—	*there, their, hair.*
—	[iə]	—	*steer, here, hear.*
—	[uə]	—	*tour, moor.*

In each Esperanto diphthong the sound is that of the first vowel glided into a short *i* (in *it*) or a short *u* (in *put*), thus :

Aⁱ **E**ⁱ **O**ⁱ **U**ⁱ **A**ᵘ **E**ᵘ **O**ᵘ

In all these diphthongs the first vowel is the important one : the glide must be light and effortless.

AJ is heard in *aisle, I, my, ay ay.*

EJ is heard in *vein, obey, may.* Do not pronounce *hejmo, mejlo,* as *hajmo, majlo* (i.e., they must rhyme with *mail,* not with *mile*).

OJ is heard in *coin, boy.*

UJ is heard approximately in *ruin* (said quickly), or *Halleluja.* The accent in **kiuj**, **kiujn**, just as in **kiu**, lies on the first syllable **ki**. Approximations are found in *(h)e (wh)o i(s)*, omitting the consonants *(ee-ooy)*, and *(s)ee (y)ou in (a minute).* It is incorrect to teach that **tiuj**, **tiujn**, should be pronounced *tee-wee, kee-ween,* or *tee-oo-wee, kee-oo-ween.*

AŬ is heard approximately in *how, now.* Strictly speaking, the first sound should be the Esperanto **a** (as in G *haus*), rather than as in A *house.* But the slight shade of difference is not of practical importance.

EŬ is the sound *eh-oo* heard in *(th)ey (w)ou(ld).* The first sound is the Esperanto **e**. Do not pronounce **Eŭropo, neŭtrala,** as **Juropo**, **njutrala**, or as **Ojropo**, **nojtrala**.

OŬ is the diphthong in S. English *go slow (goŭ sloŭ).* Though it occurs only in the word **poŭpo**, it is incorrect to say that this sound is contrary to Esperanto phonetics.

(*Daŭrigota*).

"La Granda Familio" (Marto) citas min kiel ĝian "Lingvo-Konsilanton". Mi formale deklaras, ke neniu iam petis mian akcepton de tiu ofico, nek mian konsilon pri la lingvo uzata en tiu gazeto, pri kiu mi havas nenian respondecon.—*M. C. Butler.*

La Kongresa Konkurso

Unue, ni petas la pardonon de ĉiu konkursanto pro la malfrua anonco de la rezulto. Tio ŝuldiĝas al la amaso da laboro en la oficejo post la komenco de la milito kaj en la unuaj monatoj de la jaro. Nur lastatempe ni sukcesis zorge ekzameni ĉiujn provojn.

Bedaŭrinde, ĉar la milito komenciĝis monaton antaŭ la findato de la konkurso, la nombro da provoj ne estis tiel alta, kiel ni esperis. Tamen, la rezulto de la voĉdonado estas tre interesa. Jen ĝi :

	poentoj		poentoj
1. Amsterdam ..	1689	7. Zagreb ..	1042
2. Oslo ..	1531	8. Cairo ..	887
3. Kobnhavn ..	1527	9. New York ..	862
4. Dublin ..	1203	10. Rio de Janeiro	780
5. Lisboa ..	1112	11. Buenos Aires	752
6. Tallin ..	1087	12. Tokio ..	398

Neniu sukcesis pretigi liston precize laŭ la rezulto de la komuna voĉdonado, sed kelkaj provoj estis tre proksimaj. Jen la listo de la premiitoj :

(1) J. P. W. Murray, Barnton, Skotlando ; (2) W. K. Nash, Rugby, Anglujo ; (3) W. K. Nash, Rugby, Anglujo ; (4) W. K. Nash, Rugby, Anglujo ; (5) W. K. Nash, Rugby, Anglujo ; (6) J. R. Evens, Bristol, Anglujo ; (7) F-ino A. B. Holness, New Barnet, Anglujo ; (8) I. Ekström, Turku, Finnlando ; (9) H. Siegrist, Basel, Svisujo ; (10) M. Alglave, Blanc-Misseron, Francujo ; (11) F. Taylor, Halifax, Anglujo ; (12) F. Taylor, Halifax, Anglujo ; (13) R. Mackay, Edinburgh, Skotlando ; (14) S-ino M. A. Rougier, Marseille, Francujo ; (15) G. Saurin, Marseille, Francujo ; (16) C. Lavisse, Bruxelles, Belgujo ; (17) L. Sandberg, Bekkelaget, Norvegujo ; (18) R. A. Wright, Harrow, Anglujo ; (19) T. L. C. Bluett, London, Anglujo ; (20) B. P. Blöndal, Hvammstanga, Islando ; (21) H. P. Saunders, London, Anglujo ; (22) S-ino M. C. Major, London, Anglujo ; (23) J. P. W. Murray, Barnton, Skotlando ; (24) A. J. Kalma, Amsterdam, Nederlando ; (25) G. Bachelier, Charenton, Francujo ; (26) A. H. Middlemast, Salford, Anglujo ; (27) H. Siegrist, Basel, Svisujo ; (28) G. Stone-Fry, London, Anglujo ; (29) L. Sandberg, Bekkelaget, Norvegujo ; (30) B. Everdahl, Kiruna C., Svedujo ; (31) J. R. Grocott, Blackburn, Anglujo ; (32) C. D. Hornig, Elizabeth, N.J., Usono ; (33) J. Guillaume, Noyant-Meon, Francujo ; (34) A. R. Fairbairn, Ryton-on-Tyne, Anglujo ; (35) G. Mell, Darlington, Anglujo ; (36) C. E. Bowerman, Ruislip, Anglujo ; (37) E. R. Penny, Belvedere, Anglujo ; (38) O. Olsson, Hööt, Svedujo ; (39) I. Ekström, Turku, Finnlando ; (40) H. P. Saunders, London, Anglujo.

La premiojn ni jam dissendis al la gajnintoj. La rezulto de la konkurso povos esti tre utila, kiam oni decidos pri la lokoj de estontaj Universalaj Kongresoj.

I. E. L.

JULIO MANGADA ROSENÖRN

Al tre multaj samideanoj S-ro Mangada Rosenörn estas bone konata. Li estis Prezidanto de la Hispana Esperanto-Asocio, kaj multfoje reprezentis la Hispanan Registaron ĉe la Universalaj Kongresoj. Li verkis multajn tre interesajn librojn kaj poemarojn.

Kiel oficiro en la Hispana armeo li partoprenis la enlandan militon, kaj pro la ŝanĝo

de la registaro li estas nun rifuĝinto en Alĝerio. La Argentina Esperanto-Asocio klopodas aranĝi, ke li kaj lia familio iru al Sud-Ameriko, por tie komenci novan vivon, sed kiel rifuĝinto S-ro Mangada Rosenörn ne havas la monon por pagi la vojaĝelspezon. Tio estos proksimume 24 mil francaj frankoj, el kiuj A.E.A. sukcesis havigi ok mil. Ĝi petis la helpon de I.E.L. anoj por akiri la necesan sumon, kaj I.E.L. tre volonte akceptos donacojn tiucele.

Jen peto vere subteninda. Tiuj, kiuj povas helpi al nia meritoplena samideano, estas petataj sendi donacojn al Internacia Esperanto - Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

CECIL C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

KIEL FARI STELON PER KVAR FALDOJ KAJ UNU TONDO

Fari kvinpintan stelon el papero estas facile. Por ĉiu stelo prenu pecon da papero kun formato 3 colojn larĝa kaj 5 colojn longa (aŭ samproporcia), kaj traktu ĝin jene :

1. Faldu ĝin laŭlonge.
2. La maldekstran supran angulon faldu sur la malsupran dekstran angulon.
3. La supran triangulaĵon turnu sur la faldon tuj sub ĝi.
4. La malsupran maldekstran angulon turnu ĝis la supra faldlinio.
5. Tondu laŭ la punktita linio. La ĝustan tondlinion instruos la sperto.
6. Malfaldu la fortonditan pecon, kaj jen via stelo ! La metodo estas iom malŝpara pri papero. Ĉe papero multekosta oni prefere tondu modelon el papero malkara, por poste laŭtondi aliajn.



W. H. ERRINGTON

The Esperanto Student

JE

What is a preposition ? It is a word that indicates in what relation one thing stands to another. In Esperanto we have 33. All except one have a clear and definite meaning. The exception is **je.**

The preposition *je* has no fixed meaning. It may express any relation between objects that cannot be precisely expressed by another preposition. Take, for example: to believe *in* ghosts, to laugh *at* someone, to go *on* Sunday, to arrive *at* 4 o'clock. These prepositions cannot be translated by *en, ĉe, sur, ĉe,* because these words would make nonsense. Does one "veturi *sur, en, ĉe, per* granda rapideco" ?

In all such cases we may reasonably use *je,* if no other preposition accurately indicates the relation intended.

Je is usually used to indicate the hour of the day: **je** *la kvara,* **je** 30 *post la sesa,* **je** *la dua kaj dek.*

We often use *je* also for the day and the date: **je** *mardo,* **je** *la venonta dimanĉo,* **je** *la 7a de Aŭgusto.* But here we may use the accusative instead: *mardo***n**, *la venonta***n** *dimanĉo***n**, *la 7-a***n** *de Aŭgusto.*

Do not use *je* unnecessarily. Say *plena* **de** (not *plena* **je**), **ĉe** *mia flanko* (not **je** *mia flanko*), and so on. If another preposition is available, use it in preference to *je,* as it will probably be clearer and more accurate. The over-use of *je* is a frequent fault of beginners.

PECO POR PROGRESINTOJ

Nur malmultaj partoprenis la du lastajn konkursojn sub ĉi tiu rubriko. Kial? Ĉu mi prezentis tradukotaĵojn tro malfacilajn ? Mi scias, ke ili estis pli ol kutime malfacilaj, sed ne *tro* malfacilaj por Progresintoj ! Ĉar mi ne ricevis sufiĉe bonan tradukon de la Februara "Peco", mi atendis (esperante, ke tia traduko venos malfrue—kiel kelkfoje okazis), por ĝin presigi en la sekvanta numero. Tamen ne tiel okazis. Do mi prezentas mian propran tradukon.

Nenia rafinado de la gustoj en aferoj de arto aŭ literaturo, nenia akutigado de la povo envidi en aferojn de scienco kaj psikologio, povos iam anstataŭi sentemecon al la vivo de la tero.

S-ro E. G. Bodmin plej proksime tradukis laŭ mia traduko.

Kaj mia traduko por la Marta "Peco" :

Se vi nur spronos vin antaŭen, vi atingos la lokon kun bona fruo, kaj tiel evitos malfruiĝi min ĉe tiu rendevuo kun la filino de la A.R.P.-sentinelo.

Laŭ V.V. "A.R.P." signifas "*Aeratak-Rezistaj Prizorgoj*". La provoj traduki "*A. R. P. Warden*" estis interesaj, kaj montras, ke ni devas trovi esprimon koncizan kaj klaran por ĉi tiu afero.

Nun provu traduki ĉi tion :

But the words were hardly uttered, before the smile was struck out of his face and succeeded by an expression of such abject terror and despair, as froze the very blood of the two gentlemen below.

(*R.L.S., Jekyll & Hyde*).

Mi sciiĝis, ke kelkaj grupoj uzas la "Pecojn" ĉe la grupaj kunvenoj. Se tiuj grupoj sendos al mi la provojn, mi resendos mian opinion pri la plej bona en ĉiu grupo.

P. E. DA GOGO

SUMMER SCHOOL FOR TEACHERS

The Society of British Esperantist Teachers is holding a Summer School at Buxton, Derbyshire. This will open on Friday morning, August 2nd, and close on Saturday morning, August 10th, so that members may reach Buxton before the Bank Holiday week-end.

Three groups will be arranged : *Elementary* (for teachers wishing to learn Esperanto), *Intermediate,* and *Advanced.* Classes will be held in the mornings only, the rest of the day being free for excursions and recreation.

Buxton is well known for its fine scenery and bracing climate, and has many attractions for holiday-makers.

Members of the school must make their own arrangements for their stay, and should send to the Spa Manager for the Guide-book (free of charge). This contains a list of apartments, boarding-houses, and hotels. For further information write to the Secretary of S.B.E.T. (Miss V. C. Nixon, 183, Woodlands Park Rd., Bournville, Birmingham 30). *Fee for course :* 5/- to members of S.B.E.T., 6/- to non-members.

LA ESPERANTISTA STANDARDO

Tra la tuta mondo ĉe niaj festoj flirtas nia standardo. Alveninte en kongresurbon, ĉe la stacidomo, la akceptejo, la fenestroj de samideanoj, ni ĉiam ĝoje vidas la verdan standardon kun ĝia samkolora stelo en la maldekstra angulo. Sed kiom el ni konas la originon de tiu simbolo de interpopola kompreno kaj frateco? Jen interesa anguleto de nia historio.

Iom antaŭ la unua Universala Kongreso de Boulogne nia pioniro A. Michaux iniciatis la ideon de tutmonda kongreso, kiu montros, ke per Esperanto oni povas internacie kompreniĝi ne nur koresponde sed ankaŭ parole. Jam en 1904, en Calais kaj Dover okazis kvazaŭ antaŭkongreseto, en kiu kelkaj ardaj apostoloj de la internacia lingvo pripensis la aranĝojn por vere internacia kongreso en 1905. Oni vivis tiam en la heroa tempo, kiam pro la fiasko de Volapük Esperanto estis ankoraŭ mokata de humoristoj, kiuj pli inklinis vidi en ĝi la ridigan flankon ol la idealan.

Michaux kaj lia grupo en Boulogne estis laboreme preparantaj la programon kaj aranĝojn de la Unua Kongreso. A. Michaux kaj L. Sergeant tiam estis (kaj ankoraŭ estas) advokatoj en Boulogne. Unu tagon (pledinte unu kontraŭ la alia en najbara urbeto Samer) ili ekbabilis pri la okazonta kongreso, al kiu jam komencis alflui aliĝoj el ĉiu parto de la mondo. Sur la bordo de la rivero Liane, tuj post eliro el la stacidomo, ili renkontis S-ron Duchochois, vicprezidanto de la grupo. La trio sin gratulis pri la jam antaŭvidebla sukceso de la venonta kongreso.

Unu afero tamen mankis. La Esperantistoj havis insignon: la verdan stelon akceptitan de Zamenhof en 1891. Pri himno oni jam parolis. Sed standardon oni ne havis, kaj niaj amikoj opiniis, ke tio estas manko forigenda. Dirite, farite! Ili vizitis komerciston, S-ron Gras, 11 strato Faidherbe (li ankoraŭ loĝas tie, kaj verŝajne ne konscias, ke lia butiko rajtas famon). Duchochois petas pecon da kreto, kaj sur la vendotablo desegnas kvarangulon. Sed pri detaloj? Duchochois revas pri verda standardo kun trikolora strio. Sergeant rimarkigas, ke ne estus bone naciigi la standardon. Michaux insistas, ke ĝi havu stelon. Oni pensis pri la Brita standardo de komercaj ŝipoj, kaj decidis akcepti tian formon. Oni do konsentis verdan ŝtofon kun stelo en la maldekstra angulo: sur la vendotablo formiĝas la desegno. Ĉi tie reaperas la juristoj. Antaŭ kelkaj monatoj Sergeant devis pledi en polica proceso kontraŭ Bulonjano, kiu flirtigis la papan standardon: li atentigis, ke prefekta dekreto malpermesas en la departemento ĉiun standardon, kiu ne portas distingan signon de Societo, krom se ĝi estas akceptita standardo nacia. Konkludo: necesas skribi "E" meze de la stelo.

La standardo desegnita de la tri amikoj, kaj tuj mendita ĉe la firmo Gras por la kongreso, estis do verda, longa je metro kaj duono, kaj larĝa je unu metro. Ĉe ĝia supra maldekstra angulo estis kvadrato de kvindek centimetroj, kun verda stelo, en kies mezo staris E, komenca litero de la vorto *Esperanto*.

Kelkajn tagojn poste, en la stratoj de Boulogne, sur privataj domoj, ĉe la fasadoj de la Granda Teatro kaj de la Granda Kafejo (la kongresa akceptejo), flirtadis la stela standardo.

La 9an de Augusto la kongreso kunsidis en la teatro. Kiam sur la tagordo aperis la demando pro standardo Esperantista, nia Rusa samideano D-ro J. Ostrowski, prenante ĉe la balustrado de la teatro unu el la standardoj faritaj por la kongreso, kriis:

"Ni ne serĉu! La standardo, kiu nin kondukos al la venko, kaj kiu flirtos en ĉiuj landoj de la mondo—jen ĝi estas!"

Per unuvoĉa aklamado la kongreso decidis, ke la oficiala Esperanta standardo estu tiu, kiun ni supre priskribis.

Jam dum kvarono de jarcento ĝiaj kreintoj ĝojis ĝin vidi en multaj kongresoj kaj en multaj landoj. La standardo kreita en Boulogne jam ĉirkaŭiris la terglobon. Zamenhof mem per afabla gesto konfirmis la decidon, subskribante du el la unuaj standardoj kaj aldonante la daton de la voĉdono. Oni donacis unu al Michaux; la alian al Sergeant, kiu 23 jarojn poste ĝin transdonis al la Esperanta Muzeo en Vieno.

La unuaj ŝipoj, kiuj flirtigis la verdan standardon, estis tiuj de la firmo Duchochois en Boulogne (1905). Ĝiaj tri aŭtoroj, Duchochois, Michaux, kaj Sergeant, ankoraŭ restas inter ni.

El *Norda Gazeto*, Aprilo 1931.

This year do not be satisfied till you have obtained a new member for the B.E.A. You could do no better service to the cause.

Our Bookshelf

Books starred are stocked by the B.E.A. Others should be ordered not from the B.E.A. *but from the address given. Postage extra.*

***La Lanternisto kaj aliaj prozaĵoj.**—Elektis kaj tradukis D-ro K. Bein (Kabe). Eldonis S.A.T. 207 pp., bindita, 5/6.*

En normala tempo la eldoniĝo de verko de Kabe estus kaŭzo por pardonebla ekscitiĝo flanke de la literaturamanto. En la nunaj cirkonstancoj oni devas akcepti ĝin kiel eventon. Ke iu havas la fidon kaj kuraĝon entrepreni tian eldonadon en tempo, kiam tiom da aferoj stagnas, estas kaŭzo por miro ; kaj oni povas nur esperi, ke la verko trafos la akcepton kiun ĝi vere meritas.

Legi ĉi tiujn prozaĵojn estas senti ankoraŭfoje la ĉarmon kaj allogon, kvazaŭ delikatan bonodoron, kiuj karakterizas la verkojn de la unuaj uzantoj de Esperanto. For estas ĉia klopodo al pseŭdolerteco ; for la ĵurnaleca ĵargono, kiu makulas tiom da lastatempaj eldonaĵoj. Ĉi tiu volumo portas la stampon de geniulo, kiu konas ĝisfunde sian metion.

Laŭ vidpunkto de temo, la prozaĵoj havas apartan allogon en tio, ke kvankam tre variaj, kontentigaj por ĉiuj gustoj kaj ĉiuj humoroj—sopiro al la patrujo (*La lanternisto*), amo al la homaro (*Legendo, Sur la ferdeko*), ironio kaj bonhumoro (*La lasta Amkunveno, Ĉu ŝi amas ?*) k.t.p.—ili estas, tamen, tipaj de la gento kiu ilin produktis. Kiel prave diras Th. Cart en sia antaŭparolo, " . . . la aŭtoro konservis por ni . . . tiun strangan ĉarmon de la slava literaturo . . ." Kiel ofte okazis en la historio de tiu malfeliĉa popolo, la Poloj nuntempe suferas la premegon de aligenta jugo ; sed se povus naskiĝi dubo pri la ekzisto de aparta, ekskluzive Pola kulturo kaj tradicio, ĉi tiuj literaturaj pecoj tion forigus.

La volumo entenas interalie la tutan *Polan Antologion*, kaj la tekstojn kontrolis komitato. Fari ŝanĝojn ĉe verkoj, kiuj konsistigas la fundamenton de nia literatura tradicio, estas afero kiu por la tuta Esperantistaro devas havi intereson; sed mi ĝojas diri, ke pri la jenaj prozaĵoj la komitato ĝenerale faris sian taskon aprobinde, kaj rezistis la tenton "modernigi" la verkon.

En la fino de la volumo oni aldonas liston de la ŝanĝoj faritaj, kaj tio tre faciligas la komparadon. La ŝanĝoj mem konsistas plejparte el aliigo de presaj eraroj, de vortoj neĝuste elektitaj, kaj de eraroj ortografiaj. Iom dubinda estas la anstataŭigo de majuskloj per minuskloj ĉe naciaj nomoj. Kvankam unue Zamenhof videble ne estis certa pri tio, kronologie estas konstateble, ke pli poste li definitive favoris la majusklon, ekzemple en *Fabeloj de Andersen* kaj *La Biblio*.

Mi tute aprobas la logikan aldonon de la akuzativo en la formoj *brako(n) ĉe brako, okulo(n) kontraŭ okulo*, kvankam ni scias, ke Z. uzis jen unu formon, jen la alian.

Tiuj, kiuj faros komparadon kun la originala *Pola Antologio* rimarkos la multfojan aliigon de *de* per *pro*. Tio estas moderna tendenco, sed ŝanĝo ne ĉiam aprobinda. Zamenhof kutime uzis *de* por montri *kaŭzon*, kaj *pro* por montri *motivon*—utila nuanco.

Tamen, la kritikindaĵoj estas tiel malmultaj, ke mi ne volus depreni de la valoro de la verko per citado. Mi kore rekomendas la volumon al ĉiuj : al malnovaj samideanoj pro la renaskita ĝojo, kiu estos ilia ; al novuloj pro la gajno ricevota el sintrempo en pruvita klasikaĵo de nia literaturo.

MASON STUTTARD.

Mia Unua Esperanto-Libro.—*28 pp., kun kovrilo. Prezo 6p. (afranko 1½p.), ĉe la aŭtoro, F-ino Amy Waite, 13 Vernon Rd., Birmingham 16.*

Rekomendante la enkondukon de Esperanto en la lernejon, ni ofte forgesas, ke unu grava malhelpo estas la manko de vere bonaj lernolibroj — almenaŭ por infanoj junaj. Neniu el la ĝisnunaj provoj tiurilate estas tute kontentiga. *Esperanto por Infanoj* estas pli ĝuste legolibro, ol lernolibro. F-ino Waite verkis la nunan libreton (sekvos *Dua* kaj *Tria*) sekve de praktika eksperimentado en sia propra lernejo ; ĝi do havas valoron pli ol teorian. Studinte la tri libretojn, la infanoj devus scii la elementojn de la gramatiko kaj la plej oftajn radikojn, kaj esti pretaj por simpla legaĵo. Ĉiu el la 12 "paŝoj" (Ĉu infano miskomprenos *paĝoj* ?) en la unua volumo pritraktas definitivan temon. La instruisto komprenebIe devas aldoni proprajn ekzercojn suplementajn.

De lingva vidpunkto la verko estas tute bona. Oni povas kompreni kaj pardoni la uzon de *lia* anst. *sia* (paŝo 11). Ĉe frazoj kiaj *Ĉu ĝi estas hundo ? Ne, ĝi ne estas hundo, sed, ĝi estas kato*, la vorto *sed*—kaj

ankaŭ la sekvanta komo—estas senutila kaj eĉ nelogika (ofta kritikindaĵeto en la Cseh kurso). Oni multobligis la verkon per tajpita ŝablono, kaj la supersignoj mane aldonitaj estas iom nebelaj. Kiam la nuna eldono elĉerpiĝos (kio baldaŭ okazu!), esper-eble la dua eldono povos aperi presita.

Ĉu la verko montriĝos tute kontentiga en la praktiko, oni rajtas juĝi nur post efektiva uzo en lerneja instruado. Sed en kapablaj manoj ĝi verŝajne donus bonajn rezultojn, kaj ni rekomendas ĝin provi. Ĝi enhavas multe da bonaj bildetoj facile kolorigeblaj de la infanoj.

La Jarlibro de I.E.L., 1940 (Unua Parto).—*Neaĉetebla. Ricevebla nur de membroj de I.E.L. (MJ 4ŝ; MA 8ŝ, MAH 13ŝ, MS 25ŝ). Aliĝiloj haveblaj ĉe I.E.L., Heronsgate, Rickmansworth, Herts, kaj ĝiaj delegitoj kaj perantoj.*

Hieraŭ mi provpretigis recenzon de ĉi tiu libro, kaj hodiaŭ matene la radia anonco pri la invado al Danujo kaj Norvegujo ŝanĝis la perspektivon. La Jarlibro restas ja senŝanĝa; tamen ĝia signifo pligrandiĝis kaj fariĝis pli mesaĝa. Ĝi atestas la forton de nia movado, kaj precipe tiuj partoj kuniĝintaj en I.E.L. Samtempe la foresto de Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo, kaj Polujo, atestas la sorton de niaj samideanoj en regionoj, kie estas malpermesata la *Lebensraum* al Esperanto.

Oni intencas de nun eldoni la jarlibron en du partoj. Printempe aperos adresaro kaj similaj sciigoj en grando taŭga por enpoŝa porto dum vojaĝo; la pli ĝeneralaj informoj aperas en la dua (aŭtuna) parto, kiam tiaj sciigoj aparte valoras por propagando. La ideo estas tre praktika. Ironie la unua Jarlibro laŭ tiu formo aperas en tempo, kiam alilanda vojaĝado ne eblas!

La 176 bone presitaj paĝoj montras la fidelecon de nia anaro. Malgraŭ la pasint-jara perdo en Ĉeĥoslovakujo kaj Polujo, la membraro en 1940 tamen staras je 11,496, kontraŭ 13,040 por 1939, kaj estas 1397 delegitoj (1506 en 1940). Kuraĝa Finlando duobligis sian membraron dum 1939, kaj gajnis la Internacian Konkurson. Portu-galujo, ĝis lastatempe kvazaŭ Esperanta dezerto, ankaŭ duobligis sian anaron.

La financa flanko montras la plej mal-grandan deficiton ĝis nun (£168), kio atestas la solidarecon kaj oferemon de la anoj kaj la bonan gvidadon de la estraro en tre malfacilaj cirkonstancoj. Tra ĉio brilas la sindona organizemo de la sekretario, S-ro C. C. Goldsmith.

